

Sennaciulo

NIA DOSIERO

VIVO DE
LA
HOMOJ...
paĝo 4



"Fotis: asocio de demokrataj sekslaboristoj"



Sennaciulo, januaro 2007, n° 1 (1219), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442 prezo 5 €

21-28a de Julio 2007

Tutmonda Solidareco

ANTONIO - Residence Jean ZAY

ANTONIO - Restadejo Johano Zajo

PARIZO

80-a SAT-Kongreso



NIA DOSIERO

AL NIAJ LEGANTOJ

Kiel vi povas konstati, la nova Redakta komitato decidis en ĉiu numero prezenti dosieron pri iu aktuala temo. Kadre de la temo "Vivo de la homoj" ni prezentas en tiu ĉi numero artikolojn pri la seksmerkato kaj eksploatado, mistraktado de la virinoj. Ĉi apude vi vidas bildon kiu enkondukas tiun ĉi temon, speciale la artikolon "Ĉu leĝigi la prostituadon?" Esperante ke tiu iniciato plaĉos al vi, ni deziras al ĉiuj agrablan legadon.

La Redakta komitato



Antaŭ leĝigo...



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redakcejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: 09.50.71.01.97. Retadreso: satesperanto@free.fr. TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org> Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la labor-horoj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - Cyril Orsingher, Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Jacques Bannier, Vinko Markov kaj Vito Markov.
Ĉefredaktoro : Cyril Orsingher
Enpaĝigisto: Krešimir Barković
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redakcejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuajtoj estas ĉiam la 10-a en la monato.



AL NIAJ LEGANTOJ

Komuniko de la Plenumkomitato

Ekde januaro 2007, la plenumkomitato komisias la redaktadon de la oficiala organo de SAT al pliampleksigita skipo, kiu konsistas el la malnovaj skipanoj, al kiuj aldoniĝis pliaj laborpretaj kamaradoj, kies nomojn vi legos en la kolofono. La labormaniero estos reorganizita, prikonsiderante la novajn (precipe retajn) teĥnikajn eblojn, kiuj aperis lastatempe, sed tio ne signifas, ke kamaradoj sen retaliro devas sin senti ekskluditaj el la laboro. Ĉiaj kontribuajtoj kaj helpopropoj

kompreneble restos bonvenaj. Estu ankaŭ klare al ĉiuj, ke tiu ŝanĝo ne estas kaŭzita de imagita nekompetenteco de la ĝisnuna skipo, kies membroj plejparte plu kontribuos, eĉ se okazis nova taskodispartigo.

La PK deziras sukceson al la pliampleksigita skipo kaj vokas ĉiujn membrojn al vigla kunlaborado.

En Parizo, la 5-an de decembro, La Plenumkomitato de SAT

REZULTATO DE REFERENDUMO 2006

Konforme al la statuto, fine de la jaro 2006 okazis Referendumo pri la kreo de "Kooprativa eldonfako de SAT".

La 14-an de januaro 2007, en la SAT sidejo, okazis kribrado de ricevitaj voĉdoniloj kiun faris Barbara PETIT kaj Vito MARKOV. Jen la rezulto :

POR : 106
KONTRAŬ : 8
SINDETENO : 18

Entute 132 voĉdonintoj.

Per tiu referendumo la kreo de "Kooprativa eldonfako de SAT" estas aprobita.

BALDAŬAJ LEA-KONGRESOJ

La 62-a kongreso de SAT-Amikaro (franclingvia LEA) okazos de la 7-a ĝis la 10-a de aprilo 2007 apud Bordojo. Informoj kaj aliĝkondiĉoj haveblas ĉe la OKK :

Esperanto-Gironde, ĉe Joël LAJUS, Les Places, FR-33910 SABLONS, tel: +33(0)557 692 696; retadreso: satamikarokongreso2007@orange.fr

La unua kongreso de Arci-Esperanto (itala LEA) okazos en Milano inter la 27-a kaj 29-a de aprilo 2007.

Ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe: Andrea Montagner, via Mambretti 29, IT-20157 Milano, retadreso : andrea.montagner@arciesperanto.it aŭ rekte en la kongresa retejo: <http://www.arciesperanto.it/html/kongreso/>